# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA numero 2-3 junio 1975

30 JAROJ DE LIBER A VIVO

Pasis jam tridek jaroj de la tempo, kiam la lastaj pafoj en Eŭropo anoncis al la mondo la plej sopire atendatan sciigon pri la venko de la ŝtatoj de la kontraŭhitlerista koalicio super la faŝismo. Tiu naŭa maja tago – la Tago do l' venko – gravurigis neforgeseble en la historion, en la memoron kaj ankaŭ korojn de la nacioj sur la tuta planedo.

Efektivaj valoroj perdas nenion, dum la pasado de jaroj, el sia grandeco. Por ĉiam restos historia la fakto, ke estis ĝuste la Ruĝa armeo, kiu partoprenis decidamaniere en la malvenko de la naziismo en la dua mondmilito. Ĝia venko senpere koncernis nin, ĉar ĝi sensukcesigis la detruon de la ĉeĥa kaj slovaka popoloj, kiun la hitleristaj landokupantoj estis preparantaj.

Ju pli multe da tempo forpasas, des pli klare estas, ke en la batalo kontraŭ la faŝismo en la dua mondmilito ne temis sole venki la malamikon, sed perdefendi la fundamentajn vivo-valorojn kaj certecojn, sen kiuj la homa vivo perdas sian sencon!

Ne estas hazarde, ke en nia lando la dankemo, esprimata al niaj liberigintoj, soldatoj de la glora Ruĝa armeo, identiĝis kun oferema klopodado de laboruloj en la forigado de la kolosaj damaĝoj, kaŭzitaj de la naziista okupacio al nia patrolando. Same kiel en la tempo de batalo kontraŭ la naziaj okupantoj estis precipe la laborista klaso, gvidata de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, kiu kun grandega oferemo gvidis tiun ĉi lukton pri nova enpaca vivo.

Grava kontribuo en tiu ĉi nefacila periodo estis sendiskute la helpo de Sovetunio. Sole dank' al la kuniĝo de internaj kaj eksteraj progresemaj fortoj oni povis sekurigi definitive la rezultojn de la naciliberiga batalo kaj transiri al konstruado de socialismo.

red.

STANISLAV KOSTKA NEUMANN
inter la fondantoj de nia klubo.

En junio, la kvinan, pasis 100 jaroj de post la naskiĝo de Stanislav Kostka Neumann (5.6.1875 – 28.6.1947), revolucia poeto kaj socialisma publicisto, poeta Nacia Artisto de ČSSR.

De cerbuma lirikisto kaj anarĥokomunisto li evoluis al konscia klasbatalanto, iniciatinto de socialisma kulturo.

En la jaro 1921 li estis inter la fondantoj de la Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio. Sed je 19 jaroj pli frue Neumann jam estis inter la fondantoj de ... nia Esperantista Klubo en Praha!

La fonda kunveno de EKP okazis, post prepara kunveno la 20an de junio 1902, la 9an de decembro 1902 je la 20-a horo en ĉambrego de la restoracio "U Štajgrů" en Praha. Ĝi estis granda restoracio en la strato Vodičkova, en domo, kies posedanto estis s-ro Štajgr, la patro de la glora kantistino Ema Destinová. La domo ne ekzistas plu kaj sur ĝia loko staras la nuna palaco "U Nováků". La kunvenon ĉeestis 15 personoj (el 50 invititaj). Estis elektita la unua komitato kun Ed. Feinfurter kiel prezidanto kaj komitato, en kiu estis ankaŭ S. K. Neumann. La funkcio de "inventaristo" estis atribuita al li.

Kion rakontas pri tiu evento d-ro Stan. Kamarýt, ĉeestinto en la fonda kunveno? Okaze de lia morto Kamarýt rememoras en 1947 ("Esperantistka", n-ro 6/1947):

"Morton de S. K. Neumann, eminenta ĉeĥa poeto, ni enskribas tie ĉi ne sole por rememorigi elstaran verkiston kaj batalinton por socialisma idealo, sed ankaŭ por rememorigi iaman kunlaborinton. Kiam ni, junuloj dudekjaraj, fondis en decembro 1902 Esperantistan Klubon en Praha, estis inter ni ankaŭ li, tiam poeto renomita, travivinta sian periodon anarĥisman.

Li estis ano de unua kluba komitato akceptinte funkcion de "dom-mastro" kaj dum jaro sufiĉe regule vizitadis la semajnajn kunvenojn en kafejo Union."

En la manuskripto de sia historio (eldonota) d-ro Kamarýt plu rakontas:

"Aparte memorinda (en la fonda kunveno – rim. de la aŭt.) estas la ĉeesto de S. K. Neumann, jam tiutempe fama poeto anarĥisma, poste Nacia Artisto ĉeĥoslovaka, komunista retoro, unu el la plej grandaj.

Li jam sciis la lingvon en tia grado, ke en 1901 li polemikis (en versoj) en sia revuo "Nový kult" kun Karel Dostál-Lutinov Esperantlingve, kaj Lutinov respondis ankaŭ per esperantlingvaj versoj en la gazeto "Moderní život".

La klubaj kunvenoj okazis ĉiusemajne en la konata kafejo Union en Ferdinandova str., nun Národní, kiu abonis ankaŭ esperantistajn gazetojn por siaj vizitantoj."

D-ro Kamarýt notas plu: "Ankaŭ S.K.Neumann vanadis preskaŭ regule. Li mendadis absinton.Tio estis tiam rigardata kiel pruvo de moderna ĝuokoncepto. Mi, veninta el provinca urbo Česká Budějovice, rigardis la faman poeton, kiu nubmiene sorbis sian absinton, kun tima respekto. – La kunvenoj de Esperantistaj amikoj estis agrablaj – mi rememoras ilin kun dolĉa nostalgio."

En la revuo Nový kult, redaktata de S.K.Neumann, sv. IV, 1.5.1901, p. 126-127, aperis recenzo pri la plena lernolibro de Esperanto de Čejka, Bilík kaj Holub. Ni citu (traduke) kelkajn vortojn: "La loko-manko ne permesas al ni en tiu ĉi numero motivi la simpatiojn, kiujn ni havas al tiu ĉi lingvo. Provizore, ni rekomendas al la amikoj, por kiuj gravas kontakto kun eksterlandaj kamaradoj, ellerni tiun ĉi facilegan interkomprenilon." Kaj tuj sekvas komuniko en Esperanto, kiun ni represas senŝanĝe: "Nia redakcio estas kompleza liveri al ĉiuj alilandulaj esperantistoj la informaciojn sur ĉiuj bohemaj aferoj precipe artaj kaj socialismaj. Ankaŭ oni elsangas (= elŝanĝas) la objektojn artajn (ekzemple ekz-libris, afiŝojn, poŝtkartojn) kaj aliajn objektojn de la kolektista plaĉo."

En la jaro 1905 Neumann forlasis la urbon kaj sidiĝis en la vilaĝo Sečkovice apud Brno. Li kantas pri tio en siaj versoj:

> Z radosti a míru vzcházejí mé sloky,
> smutků překonaných bývá na nich pel....
> Unikl jsem z města mílovými kroky,
> k zdroji věčné něhy blah jsem odešel.

„La dek moraviaj jaroj influis renaske lian poezion. Tiam ekz. kreiĝis lia Kniha lesů, vod a strání.

Vivu la vivo! Tio estis simpatia devizo de la homo, je kies memoro nia klubo preparas, per iniciatemo de J.Vlasák, inaŭguron de tabulo sur la fonda loko de nia EK.

Do, tia estis la rilato de Stanislav Kostka Neumann al nia klubo kaj al Esperanto. Ni povas ripeti kun d-ro Kamarýt: tiun ĉi rememoron pri la glora verkisto ni ne forgesos.

Jaroslav Mařík (9-6-75)

-------------------------------------

P.S. Pro la citaĵo el "Nový kult" ni dankas al nia klubano O.Kníchal, kiu en la lastaj semajnoj serĉis en la jarkolekto 1901 de tiu gazeto.

## S.K.Neumann: KANTO VENDREDA

Mia popolo! per terur'
ili entrudu ĉion,
tenu nur koron en la pur',
estas ĝi via firma mur'
ruzo nur venkus nacion.

Nia popolo! via kred'
je l'harmoni' homara,
diru, ne estas por aĉet',
vi ĝin defendos sen paŝ-ced'
dum kanonad' barbara.

Scias vi vivi en esper'
pri lando promesita,
idoloj falos al la ter'
nur ĝi eliros el danĝer'
al la sanktej' celita.

Havas vi amon al la lum',
lumo sanigas,
ĝin ne detruos ia um',
ho vivu lum', ho vivu lum',
obskuron lum' timigas.

Limas obskuro kaj morto ĝin,
amu, esperu, fidu, fieru
pri la viv-destin'
kiel tili' en kamp' aŭ monta pin',
la fremdan ne avidu!

Trad. R. Hromada

## ANNA BÁROCHOVÁ NE PLU INTER NI .....

La 26-an de aprilo 1975 grava perdo trafis nian klubon: post longa malsano mortis ĝia honora membrino Anna Bárochová (nask. 23-an de majo 1894 en Přibyslav), ŝi fariĝis esperantistino en 1922, en kurso de R. Hromada, kaj de 1927 ĝis sia morto ŝi estis aktiva komitatanino (de 1937 kun la funkcio de kasistino) de nia EKP. Ŝi instruis Esperanton al blinduloj kaj akompanis ilin al Universalaj Kongresoj. Sep UK ŝi partoprenis. Krom en sia klubo, al kiu ŝi dediĉis sian tutan liberan tempon ankaŭ kiel ekspedantino de la "Bulteno", zorgantino pri vojaĝantaj esperantistoj kaj pertelefona informantino pri Esperanto, ŝi helpadis ankaŭ en la oficejo de EA-ĈSR, kies komitatanino ŝi ankaŭ estis.

Sinjorino Anna Bárochová estis virino plene sindona al la Internacia lingvo kaj al ĝia ideo. Okaze de 20 jaroj de ČSSR ŝi ricevis honoran diplomon de ĈSEK, MEM dekoris ŝin (1973) per sia jubilea insigno kaj ĈEA nomis ŝin en sia konstitua kongreso honora membrino.

Kvardeko da esperantistoj adiaŭis al ŝi dum la kremacio, inter ili la prezidanto de ĈEA, Josef Vítek, per sia adiaŭa alparolo.

Ni neniam forgesos Vin, kara sinjorino Bárochová ...

red.

INĜ. EDUARD FELIX mortis 19.5.1975 estante 75-jara. Dum sia vivo li estis pioniro de aviado, konstruisto, verkisto ktp. Li instruis Esperanton en pluraj someraj tendaroj, kunlaboris en la Lingva komisiono de ĈEA, lingve reviziis eldonotajn manuskriptojn, kun nia membro Ing. Novák kreis terminaron pri karateo, estis redakciano en "Starto", plurfoje kontribuis en niaj klubaj programoj. Okaze de sia 75-jariĝo nomita honora membro de ĈEA.
Lia vivo estis plena de laboro, amikemo kaj multflankaj interesiĝoj. Trideko da klubanoj adiaŭis al li la 23-an de majo, la Klubo metis florkronon al lia ĉerko. La adiaŭan parolon faris J.Vítek, prezidanto de ĈEA.

o-o-o-o

La 1-an de aprilo 1975 mortis nia longjara membro kaj komitatano BEDŘICH DRYÁK en la aĝo de 75 jaroj. Li zorgadis en nia EK precipe pri teknikaj aferoj (projekciado k.s.). Pluraj membroj ĉeestis lian kremacion la 7-an de aprilo kaj nia Klubo metis flor-bukedon al lia ĉerko.

o-o-o-o

red.

Informace o výroční členské schůzi Klubu esperantistů
v Praze, konané dne 7. dubna 1975 v kavárně "U Bumbrlíčka"
(Výňatek ze zápisu)

---

Přítomno: 50 členů (dle presenční knihy)

V zastoupení předsedy zahájil dr Miloš Nývlt výroční členskou schůzi a určil jako zapisovatelku sam. Welterovou.

V úvodu byla věnována tichá vzpomínka všem členům, zemřelým v uplynulém období, včetně právě zesnulého Bedřicha Dryáka.

Následovala kulturní vložka mladých členů hudebního tria Kaucké, Hostomského a Macoucha, kteří svou interpretací Haydnovy sonáty sklidili velký úspěch.

Jaroslav Mařík poté podal zprávu o činnosti klubu za uplynulý rok:

La raporto tuŝas la tempon de la 22-a de aprilo 1973, kiam okazis la jarkunveno 1973, ĝis la pasinta kunveno, okazinta la 24-an de marto 1975 (la 30-an de marto ĝi ne okazis pro la Pasko).

Ĉar la enkluba aktiveco estis sufiĉe detale priskribita en la lastaj numeroj de nia Bulteno, en la sekvanta raporto ni aŭdu sole ekstrakton:

Okazis 45 kunvenoj, kiujn ĉeestis minimume 1430 (subskribintaj sin en la kluba libro) membroj kaj krom ili 173 gastoj. Meznombra ĉeesto de membroj: 32. Kunvenoj en la restantaj semajnoj ne okazis pro festotagoj. La gastoj venis el jenaj landoj: Aŭstrio, Britio, Bulgario, ĈSSR, Finnlando, Francio, FRG, GDR, Hispanio (Kanar.insuloj), Hungario, Japanio, Jugoslavio, Kuvajtio, Meksikio, Pollando, Rumanio, Svedlando, USSR, do el 18 landoj.

La 45 klubajn vesperojn ni povas dividi laŭ jenaj temoj:
- aktuala politika problemaro .... 4, event. 5 vesperoj (Internacia tago de infanoj, Slovaka Nacia Revolucio, Granda Oktobra revolucio, kaj datreveno de la Kongreso de pacamaj fortoj en Moskvo, 27-a dat-reveno de la Februara venko kaj event. La Zamenhofa vespero pro sia eksplicite porpaca karaktero:
- ĝenerale kulturaj aferoj ...... 5 vesperoj; d-ro Horský; J.A.Komenský, la sama; Milič z Kroměříže kaj Jan Žižka, gloraj datrevenoj de la ĉeĥa reformacio; ... Bendová; Comenius; Kynčl: Kreskaĵoj kaj la moderna homo; ... Hejnová: D-ro Albert Schweitzer (100-a naskiĝdatreveno).
- literaturo kaj arto ...........8 vesperoj;
- deklamvesperoj ............... 2 (de Budapeŝtanino kaj de Eva Seemannová);
- literaturaj vesperoj ......... 2 / Kynčl kaj Pavlíček/j
- 1 koncerto;
- vojaĝpriskriboj: ............. 4 vesperoj, ĉiu el ili plenumita de eksterlandano (pri Izraelio, Finnlando,

Hispanio, pri esperant. libertempoj en diversaj landoj)
- filmvespero .............1 (Šperling: Renkontiĝoj en Mělník)
- historio ............. 3 vesperoj (ĉefe de sam. Bartošík)
Vespero honore al eminentaj esperantistoj: al A.Bárochová, L.L.Zamenhof, P.Sádlo (la lastan vidu sub "arto").
La ceteraj vesperoj estis dediĉitaj al aktualaĵoj de la E-movado.
- Kaj laste: en neniu vespero dum la jaro estis "amuza programo"

La kluba informilo (Bulteno) estis eldonita sub la numeroj: 1/1974, 2-3/74 kaj 1/1975. Kiel mankon oni povas mencii, ke ne aperis en ĝi agadraporto pri la jarkunveno 1973.

Krom la agado pure enkluba ni faris ankaŭ ion ekster la klubo: 1 aŭtobusan ekskurson (en oktobro – Renkontiĝo en Mělník), 2 kursojn de Esperanto: A.Slanina en la kulturĉambro de ČSD (staci-domo Smíchov) kaj d-ro M.Nývlt (komenoantoj, en ČKD-Kompresory, Praha)

Iuj el la klubanoj (precipe la UEA-delegito J.Tomčík), dediĉis sin al gvidado de gastoj kaj aliaj al serĉado de aŭtodeponejo cele de akiro de porkluba ejo (ĉefe sam.J. Vlasák). La Klubo aĉetis laŭtigan aparataron (kun 2 mikrofonoj kaj 2 reproduktiloj) por la kunvenoj kaj reakiris 4 artismajn bildojn kun temoj el esperanta vivo.

La kunvenojn gvidis plejparte L.Kynčl. – Okazis ankaŭ kelkaj komitataj kunvenoj."

Nato přednesla sam. M. Juřenová zprávu hospodáře, podle které klubovní majetek (inventář) činí mimo finanční prostředky úhrnně ...Kčs 11.289,- Sam. A.Zmeškal podal zprávu o činnosti knihovny EKP za rok 1974:
Uvedl m.j, že po přestěhování knihovny do Jilské ulice v prosinci 1973 bylo od 3.4.1974, kdy byl znovu zahájen její provoz, půjčeno do konce roku 1974 celkem 270 knih, z toho členům 116 a mimopražským čtenářům 154. Dále hovořil ve své zprávě o tom, že se projevila velmi dobrá spolupráce s Českým esperantským svazem, doložená i dary do knihovny (42 knihy a 83 ročníky časopisů).
Po provedeném přetřídění knih a časopisů a jejich konečné registraci bylo zjištěno, že knihovna má k dnešnímu dni 5.798 titulů. Ve srovnání s rokem 1973 znamená to přírůstek 445 titulů. Mnoho dobrovolné práce věnovala knihovně nově se přihlásivší pomocnice pí Krista Budková.
Nutno vřele poděkovat jí i dalším pracovníkům, kteří se buď zúčastnili přestěhovaní knihovny, nebo prováděli pro ni jiné práce, zejména samideánům Bartošíkovi, Křimskému, Čížkovi, Kynčlovi, Šerclovi, Ševčíkovi, Vítkovům (mladšímu i staršímu) a Železnému. Navíc nutno vyzdvihnout obětavost samideána Štercla, který v roce 1974 svázal 68 knih pro naši knihovnu!
Pokladní zprávu vypracovala ještě pí A.Bárochová a v jejím zastoupení ji přednesl sam.Šperling:
Bilance za rok 1974 vykazuje zisk /výnos/ ..... Kčs 1129,10
z roku 1973 byl převeden výnos ................ 9449,45
takže skutečné finanční prostředky klubu
činily k 1.1.1975 ......................... ... Kčs 10578,55.
Z toho v příruční pokladně Kčs 65,05 a u SBČS zbytek 10.513,50 Kčs.
Další hlášení:
V roce 1974 měl Klub esperantistů v Praze celkem zaregistrovaných 316 členů, z těchto odvedl svazu čl.přísgěvky za 268 členů. 48 dosud nezaplatilo. Za rok 1973 nezaplatilo 10 členů, ačkoliv byli několikrát upomínáni. Tentokrát jsme jim Bulteno již neposlali. Kromě členů má Klub také 53 příznivců, kteří poslali v r. 1974 dobrovolný příspěvek na tiskový fond nebo drobné dary.
Do dnešního dne jsme odvedli svazu čl. příspěvky za 229 členů za r.1975, mezi nimi získáno 12 nových členů za rok 1975. V roce 1974 jsme získali 22 nových členů a 27 příznivců (dárců).
BULTENO dostávají všichni členové, vyjma rodinné, STARTO jen kategorie A,B,C.

V roce 1974 zemřeli tito členové: Josef Petrlík, Anežka Prokůpková, Marie Rajnyšová-všichni z Prahy a příznivkyně Milada Vybulková z Hradce Králové - v roce 1975 Anna Musilová z Poděbrad a 1.4.1975 Bedřich Dryák z Prahy.

Revizor sam.J.Šperling pak přednesl vlastní revizní zprávu, v níž uvedl, že revizní komise ve složení J.Šperling – V.Ševčík (který byl výborem dodatečně kooptován do této funkce za p.Hoška) provedla revizi vedení pokladních a účetních dokladů a inventáře.
Pokladní zpráva, sestavená pí Bárochovou, je v souladu s předloženými doklady. Příjmové a výdajové doklady jsou řádně účetně evidovány a je proto na místě pí Bárochové za svědomité a přesné vedení pokladní agendy poděkovat. Při této příležitosti je také nutno poděkovat p.Tomčíkovi a Slaninoví za vzorné vedení esperantských kursů.
U samid.Slaniny nebyly konstatovány při revizi žádné výdejové doklady a sám se zřekl zcela i učitelského honoráře. I sam.Tomčík se zřekl honoráře ve prospěch klubu. Kladně nutno hodnotit i dětský esperantský kurs v libeňské škole v Lindnerově ulici, vedený pí Urbanovou, který - jak jsme se na místě přesvědčili - zaznamenává dobré pokroky a jistě přinese našemu hnutí i společenský užitek.
Dále byla provedena revize inventáře. M.Juřenová, která převzala funkci hospodáře za B.Dryáka, předložila doklady o inventárním majetku našeho klubu. Při přejímání funkce překontrolovala inventář a současně prověřila majetek uložený mezi členy klubu. Při revizi se doplnily do stavu některé drobné předměty, které je nutno vést evidenčně.
Na základě revizního šetření doporučuje revizní komise novému výboru zabývat se těmito úkoly:
1/ Zajistit vhodnou místnost pro knihovnu, kde by případně mohl být umístěn i inventář klubu. Tento úkol z loňského roku nebyl splněn.
2/ Schválit odpis znehodnoceného inventáře.
3/ Zaměřit úsilí na vybudování propagačních vitrin po vzoru samideána Jana Vlasáka.
Po skončení revizní zprávy byla jednomyslně zvolena volební komise ve složení: Jindřich Košťálek, Jarmila Šperlingová a Tomáš Pavlíček.

Protože se k další diskusi nikdo nepřihlásil, bylo přistoupeno k dalšímu bodu programu: Jednomyslným souhlasem bylo uděleno absolutorium odstupujícímu výboru a byl mu vysloven dík za jeho činnost.
Dále bylo jednomyslně schváleno, že volba nového výboru bude provedena aklamací. Volební komise předložila na výzvu předsedajícího dr.M.Nývlta členské schůzi kandidátní listinu, na níž pak následující jednomyslnou volbou nedošlo k žádné změně.(Seznam zvolených členů výboru je uveden dále).
Arch.Josef Drlík přijal funkci předsedy i na další rok.
Jednatelka klubu podá písemnou zprávu o konání výroční členské schůze a o složení výboru EKP Národnímu výboru hl.m.Prahy-odboru pro vnitřní věci.
Bylo stanoveno, že plán činnosti bude postupně projednán v příštích schůzích výboru.
Poté promluvil dr.Horský-člen výboru a referent pro MEM- na námět "O našich úkolech a odpovědnosti". Ve svém projevu zdůraznil nutnost neustále pracovat pro věc míru, bez něhož i myšlenka Zamenhofova není uskutečnitelná, a zároveň s potěšením konstatoval, že v posledním roce vzrostl mezi členy klubu zájem o veřejné a politické otázky a tedy i o činnost mírovou.
Tato rezoluce byla pak jednomyslné přijata.

Ve 21,30 hod. ukončil dr.M.Nývlt výroční schůzi s poděkováním všem účastníkům a oznámil, že se ihned koná první ustavující schůze nově zvoleného výboru.

První schůze nově zvoleného výboru rozdělila funkce takto:

| | |
|---|---|
| předseda | : arch. Josef D r l í k |
| místopředsedové | : 1/ dr. Miloš N ý v l t |
| | 2/ Jaroslav M a ř í k |
| | 3/ Adolf B a r t o š í k |
| referent MEM | : prof. dr. Rudolf H o r s k ý |
| kulturní referent | : Ladislav K y n č l |
| redaktoři BULTENA | : Václav L o r e n z |
| | Jaroslav M a ř í k |
| | dr. Miloš N ý v l t |
| referenti mládeže | : Olga Š á d k o v á |
| | Jan V l a s á k |
| pokladní | : Anna B á r o c h o v á |
| hospodář | : Miloslava J u ř e n o v á |
| knihovník | : Alois Z m e š k a l |
| pomocnice knih. | : Marie Š v e h l o v á |
| jednatelka | : Františka W e l t e r o v á |
| proz. bez funkce | : Ing. František S v i t á k |
| | Milada J o s k o v á |
| | |
| Revizní komise | : Jar. Šperling |
| | Jan Pils |
| | Václav Ševčík |

o-o-o-o

Změny ve složení výboru, vyvolané po výroční schůzí úmrtím zasloužilé členky Anny Bárochové:

Na výborové schůzi dne 12.5.1975 byli do výboru EKP kooptováni tito členové klubu:
Jan P i l s .....do funkce pokladníka .
Pavel R a k .... do funkce druhého jednatele.
Jan Pils byl zároveň zproštěn funkce předsedy revizní komise a novým předsedou této komise byl zvolen Jaroslav Šperling.

o-o-o-o-o-o-o

## Jubileo de Vuk Echtner

La 10-an de junio ĝisvivas la 70-an naskiĝ-datrevenon nia longjara membro kaj unu el la plej konataj pioniroj de Esperanto en ĈSSR, s-ano V u k  E c h t n e r. Nia membrino M. Josková vizitis lin en lia nuna hejmo en Ĥodujo kaj ĉi tie ŝi resumas (kun ioma redakcia kompletigo) lian vivovojon.

V. Echtner naskiĝis en 1905 en apudlima ĥoduja urbeto. Laŭprofesie li estis fremdlingva korespondisto kaj poste prokuristo en granda enterpreno en Praha, sed lia pedagogiemo igis lin, post koncernaj studoj, fariĝi en 1958 instruisto en mezgrada blindula muziklernejo (Deyl-instituto). En 1965 li emeritiĝis.

Jam en 1918, do dektrijara, li fariĝis esperantisto, en 1993 aniĝis en EK Praha, aktivis inter la junularo, eniris la blindul-movadon kaj kunlaboris kun K.E.Macan, fama ĉeĥa muzikkomponisto kaj pedagogo en la blindula Klár-instituto en Praha. Unu lernanto el liaj E.-kursoj en la Instituto fariĝis aparte fama: la ĵazkomponisto Jaroslav Ježek... La jubileanto partoprenis kvin universalajn kongresojn, kunorganizis en 1927 la konatan internacian konferencon "Paco per lernejo" en Praha, kunlaboris al la "Ĉeĥoslovaka antologio". De 1929 ĝis nun li estas redaktoro de la esperantlingva brajle skribita revuo "Aŭroro", legata en multaj landoj. Interese: la "Aŭroro" estas la esp.-lingva

revuo kun la plej longa aper-daŭro en ĈSSR! Dum la lastaj 22 jaroj li brajligis pli ol 30 lingvo-lernolibrojn kaj adaptis ilin por blindulinstruado de la lingvoj angla, germana, rusa, slovaka, hispana, nederlanda kaj Esperanta.

Li instruis Esperanton en pluraj someraj E.-tendaroj, dum kelkaj jaroj gvidis la Lingvan komisionon de ĈEA /komisiona aktiveco en 1973: 8 laborkunvenoj, 1.612 lingvaj konsultoj, adapto de 26 fakaj tekstoj), gvidis skriban E.-kurson ĉe Okresní kulturní středisko Domažlice (ekz. en j.1973: 70 partoprenantoj ricevis de li 2,481 lecionojn).

Li multe okupas poŝton: ekz. en la indikita jaro li prilaboris sume 5.858 korespondaĵojn 2515 akceptitaj, 3343 forsenditaj. Lastatempe li ankaŭ redaktas, laŭ komisio de ĈEA, la manuskripton de d-ro Stanislav Kamarýt pri la historie de Esperanto en nia lando kaj gvidas lingvan rondeton ĉe OB en Díly.

Nunjare li mem redaktas jato la 49-an jarkolekton de la "Aŭroro", brajligas lernolibron de la rusa por ĉeĥoj, de la nederlanda por germanoj, instruas ankaŭ la rusan, anglan kaj germanan.

V. Echtner, krom tio, aktivas en la neesperantista kulturmovado enlanda, skribas regionan kronikon por la Nacia Komitato kaj ... Neimagebla laboro kolekti ĉion pri lia aktiveco, tuŝanta tiom da kultursferoj!

La laboro de Vuk Echtner jam estis alte aprezita pro sia 50-jara aktiveco inter blinduloj li estis dekorita per la medalo de Emilie Suchardová – la plej alta rekono en tiu movado -, respekton al lia laboro montris la ĉefaj presorganoj Rudé právo, Pravda , La Ĉs. Televido k.a. Nunjare li ricevis la honoran jubilean insignon de MEM.

La devizo de ĉiu lia laboro, kiun oni ankaŭ povas legi sur ĉiu "Aŭroro", dekomence estas: Interkompreniĝo, Amikeco, Paco.

Ni deziras al la jubileanto tre bonan sanon por la estonteco kaj ĝojon pro pluaj laborsukcesoj!

red.

ELSTARAJ PERSONOJ PRI LA IDEO DE INTERNACIA LINGVO

(daŭrigo)

Sir Isaac N e w t o n (1642-1727) - angla granda matematikisto kaj fizikisto

penis konstrui universalan lingvon. En la ne publikigita manuskripto, skribita verŝajne antaŭ lia eniro en Trinity College en Cambridge en 1661, troviĝas koncernaj notoj. La samspecaj notoj troviĝas en lia notlibro. Newton dufoje prilaboris la universalan lingvon. La unua parto de la manuskripto (40 p.) prezentas nomitan de li skizon kaj la dua parto (15 p.) prezentas tiel nomitan skemon, verŝajne pli poste faritan, kiu estas pli detale kaj vaste prilaborita, eble sub influo de la verko de Dalgarno "Ars Signorum".

Newton komencis per natura nomo de aferoj (objektoj) kaj sugestis klasifikon de nocioj, formontaj la bazon de la vortaro. Li havis tendencon nomi ĉiun kategorion per fiksita litero. Ekzemple: instrumentoj per litero "S", bestoj per "t", stato de animo per "b", k.t.p. Li kreis tabelojn de konjugacioj. Newton enkondukis gradigojn de vokaloj, diftongoj kaj konsonantoj. Per aldono de diversaj literoj antaŭ prefikso li kreis modojn, tempon, pluralon k.s. Kompreneble, ju pli specifa estis la vorto, des pli longa ĝi estis. Newton ne donis liston de radikoj, sen kiuj la lingvo ne estus uzebla. La skemo ne prezentas gramatikon kaj sintakson kaj havas malmulte da ekzemploj ("Tor"- varma - varmeta, malvarma, "ben" - nomo, "tal" - pentristo).
La skemo havas multajn mankojn.

(Ralph. W.V.Elliot: "Isaac Newton's of an Universall Language", "Modern Language Review", Vol. 52, 1957. N-ro 1 (Jan./P.1-18)

Gottfried Wilhelm L e i b n i t z (1646-1716) - germana filozof kaj matematikisto

"Signoj, kiuj esprimas ĉiujn niajn ideojn, formiĝos por nova lingvo, kiun oni povos skribi kaj paroli, estas malfacile ĝin krei, sed facile oni lernos ĝin. Admirinde ĝi servos por interkomunikiĝo inter multaj popoloj. En lingvo universala oni kreos poemojn kaj himnojn, kiujn oni povos kanti.
Tiu ĉi universala lingvo estos la plej granda organo de la racio. Mi kuraĝas diri, ke ĝi estos lasta peno de la homa spirito.
Kaj kiam tiu ĉi projekto estos efektivigita, nur de la homoj dependos, ke ili estu feliĉaj, ĉar ili posedos la idiomon, kiu ne malpli servos por entuziasmigi la racion, ol teleskopo por plifortigi la okulon.
Mi estas certa, ke neniu eltrovaĵo estas tiel grava, kiel universala lingvo kaj nenio sukcesos tiel eternigi la nomon de la elpensinto.
("Opera omnia", Genéve, 1768, Vol.VI.P.267)

(Laŭ I.Dratwer: Internacia lingvo dum jarcentoj. Eld. CED)

N i i n f o r m a s .....

- 2x en Radio Praha
  La stacio Praha informis lastatempe dufoje pri la por- kaj per-esperanta iaboro de nia membrino, instruistino Eli U r b a n o v á : la 29-an de aprilo, en la sabatvespera programo laŭ proponoj de aŭskultantoj, kaj la 13-an de majo (vespere en la "Karuselo"). Oni informis pri sia laboro en la baza lernejo en Praha 8-Libeň, kie ŝi gvidas lau interesa metodo kurson por lernejanoj kaj Klubon de internacia amikeco, kies iuj membroj jam scias eĉ legi librojn, kiuj ekzistas jam en la kvanto de tridek mil en Esperanto. Lastfoje oni ankaŭ ĝenerale informis pri "Esperanto, lingvo, apartenanta al ĉiuj kaj tamen al neniu".

- GRAVA ATENTIGO
  Dum la someraj du monatoj julio kaj aŭgusto, la kafejo "U Bumbrlíčků" restas denove fermita dum la vesperoj, kiel pesintjare. Ni informas la membrojn, ke dum tiuj du monatoj, do de la 30-a de junio ĝis la 25-a de aŭgusto, niaj klubaj kunvenoj okazos en la stacidomo Praha-Smíchov, II-a etaĝo, la Lernoĉambro de ROH (apud elirejo de stacidomo) 19-21 horo ĉiulunde
  Uzu la ŝtuparon, kiu troviĝas apud la stacidoma elirejo.
  (Ni dankas pro tiu ĉi ebleco de somera kunvenejo al s-ano Babička!)

- Eksterlandaj esperantistoj propagandas Ĉeĥoslovakion
  El letero de s-ano Ramon Molera, Barcelono (Moyá), kiu aŭtune 1974 vizitis Pragon kaj prelegis en EKP:
  "Antaŭ unu semajno mi prelegis pri via lando ĉe loka kultura societo, kies prezidanto mi estas, pere de koloraj diapozitivoj aĉetitaj en Prago. La kunveno ege sukcesis kaj partoprenis preskaŭ 100 personoj – granda nombro, se ni konsideras, ke nia vilaĝo havas nur 3.000 enloĝantojn. La demandoj estis multaj kaj mi provis respondi kiel eble plej bone laŭ mia bontrovo."

J.T.

N i a l v o k a s .....

DŮLEŽITÉ UPOZORNĚNÍ VŠEM ČLENŮM !

Žádáme naléhavé všechny své členy, kteří nesplnili svou členskou povinnost a nevyrovnali dosud členské příspěvky na rok 1975, aby tak neprodleně učinili.

Při té příležitosti zároveň upozorňujeme, že naši členové mají možnost již dnes poukázat příspěvky na rok 1976, což by výbor Klubu za stávající situace přivítal.

N i a f e l i e t o n o

Jaroslav Mařík: Plaĉas esti gasto de HEA

En la tagoj 19-20an de aprilo mi havis la okazon esti gasto de Hungara Esperanto-Asocio kiel delegito ĉe ĝia solena kunsido okaze de la 30-a datreveno de la liberigo de Hungario fare de la Soveta armeo.

En mia saluta alparolo, krom bondeziroj, mi tuĝis ankaŭ iujn aferojn de kunlaboro inter la movadoj de ambaŭ landoj, inter ili la kontakton inter Julio Baghy kaj nia Eva Seemannová, el kiu rezultis la fondo de la "Verda Ĉaro de Julio Baghy", artisma kolektivo de EK Praha. Kora aplaŭdo montris, ke la vortoj agrable tuŝis la delegitojn, kiuj venis el ĉiuj kluboj de la lando.

HEA zorgis modele pri la eksterlandaj delegitoj: unuarangaj loĝigo kaj manĝado, ĉiam mikrobuso kaj esperantlingvaj gvidantoj dispone. Oni tuj akceptis mian proponon ebligi al la delegitoj (el Bulgario, ĈSR, GDR, Pollando kaj SSR) viziton al la tombo de Julio Baghy. La mikrobuso venigis nin ĝis la tombo, situanta sur tereno, kiu estas en la stato de noviga reordigo: granda, estinta ĝenerala tombejo estas nuligata kaj sur ĝia loko estas starigata tombaro de gloraj hungaroj - analogiaĵo de nia Slavín en Vyšehrad, sed ne kompareble pli vasta. Kaj tie kuŝas Baghy, la Paĉjo. La Nacia komitato de Budapeŝto, laŭ propono de HEA, transportis la korporestaĵojn el origina tombejo kaj reentombigis en tiu ĉi glorula tombaro. La delegitoj metis florojn sur la tombon, ĉirkaŭatan de sabloŝtona rando, sur kiu simplaj, sed elokventaj vortoj en IL ĉiam plu avizos la preterpasanton, kiu tie kuŝas: "PAĈJO, LA HOMA HOMO".

Interesa estis nia vizito en la entrepreno de eksterlanda komerco TESCO, organizo por teknika kaj scienca kunlaboro, simila al nia PZO Polytechna, pli precize dirite, en ĝia instituto por loĝigo kaj eksterlerneja plueduko de studentoj junaj teknikistoj kaj metiistoj el evolulandoj. Viglan diskuton partoprenis ne nur ni, delegitoj, sed ankaŭ la direktoro Gyorgy Marián kaj fremdlandaj studentoj. Ni estis forte impresitaj de la vervo kaj kuraĝo, kiuj karakterizis la diskut-kontribuojn de junuloj el Kamboĝo kaj Bangladeŝo, respondantaj demandojn pri la aktuala okazado en iliaj landoj. La tuta diskuto okazis en IL, kiu ankaŭ estas instruata en TESCO. Nur por la direktoro oni hungarigis la parolojn. Tiu finis la ĉarman kunsidon per konstato, ke la internacia lingvo havas gravan signifon por la internacia kunlaboro kaj ke la edukatoj de TESCO post sia reveno hejmlanden funkcios kiel bazaj ĉeloj por internacilingva movado en iliaj evolulandoj.

Mi volas mencii ankaŭ unu epizodon dum ekskurso sur kelkaj altopunktoj de la montaro BUDA, de kie vidiĝas bela panoramo de la tuta metropolo: ni vidis, en la rando de arbaro, signaladon per esperantista flago. Kolego J. Uśpieński el la varsovia radio (sed kiu por mi, post pluraj interesaj diskutoj, fariĝis simple "Ĵerĵi"), proponis esplori la aferon, Do, kion signifis la signalado per la verda flago? Per tio kunvokiĝis infanoj tie ekskursantaj, junpioniroj de Esperanta studrondo. Por la infanoj venis en tiu momento la "fajrobapto" en konversacio kun alilandanoj.- Interesa surprizoto, en arbaro apud la hungara ĉefurbo!